

MEDICINISTAJ INFORMOJ

JARKOLEKTO 1976

NUMERO 4

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

M E D I C I N I S T A J I N F O R M O J - cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj la ruĝkrucaĵoj.

E L D O N A S : Ĉeĥa Esperanto Asocio - medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1, ĈSSR – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto STARTO

R E D A K T A S : MUDr Josef Hradil kun lingva konsilanto MUDr Josef Černý. Grafika kunlaboranto: Jaroslav Klement, Karlovy Vary

KIAMANIERE ABONI AL NIA CIRKULERO :

BRITUJO : W. LAURIE, 1, FARRINOTON, 54, West Cliff Road,
Bournemouth HH 4 . 8BE, Britujo

FRANCUJO : MUDr YVETTE VIERNE, 5 RUE DOCTEUR HOUX, F 34
MONTPELLIER, Francujo

G D R : JURGEN HAMANN, PUCHAUER Str. N— 3, 705
LEIPZIG, GDR

HUNGARIO : MUDr EVA STANZ, RÁKOCZI u. 64 III/34, BUDAPEŠŤ,
Hungario

BULGARIO : MUDr GEORGI POPOV, str. STAMBOLIJSKI 41, 9850
PRESLAV, Bulgario

JAPANIO : SABURO YAMAZOE, 371 MAEBASHI - SHI, IWAGAMI -
MACHI 4/8/9 GUNNA - KEN, Japanio

JUGOSLAVIO : MUDr PETER ZLATNAR, ŘÍMSKÁ 7, LJUBUANA -
Jugoslavio

POLLANDO : MUDr MARIAN LABA, SZY1.ÍAN0WSKIEG0 2/4, 75-546
KOSZALIN, Pollando

RUMANIO : MUDr GÁBOR LAZAR, str. STEFAN CEL MAŘE 26/A,
4055 COVASNA, Rumanio

USA : ESPERANTO, 3318 N. LAKE SHORE DRIVE, N— 801
CHICAGO, ILLINOIS, USA

USSR : IVAN PAIKIN, ŠVERNIKA 7, korp. 3, kv. 44,
117 449 MOSKVA V-449, USSR

MEDICINISTAJ INFORMOJ estas mendebla aŭ ĉe perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio por 7 rpk.
Prezo ĉe perantoj estas 3,5 US dolaroj, egalvaloro en libroj aŭ aliaj esperantaĵoj.
Ne sendu ĉekojn !

DANĜERO

DE DIFEKTO DE MALDEKSTRA KORONARIA ARTERIO DUM OPERACIO DE MITRALA VALVO ĈE OKAZOJ DE DIFEKTOJ DE STRIA SEPTO KAJ DUM KOREKTO DE TRANSPOZICIO

/The Hazards to the left circumflex coronary artery during mitral valve surgery in cases with arterial septal defects and corrected transposition/

Scand J. thorac, cardiovasc, surg.6,, Nro 3, paĝo 215-217, 1975

Kvankam el pli fruaj sciigoj estas konata risko de difekto de maldekstra koronaria arterio, spertis la aŭtoroj du okazoj de mortiga difekto de tiu ĉi arterio dum difekto de la atria septo. Koronaria cirkumflexa arterio estis rilate sian anomalan trairon difektita per kudrero dum estigo de anuloplastiko pro difekto de la atria septo – la arterio estis difektita 10 cm de la branĉiĝo. En aliaj kazoj okazis la lezo 2,5 – 3 cm de la branĉiĝo de la vazo. La malfruiĝinta apero de simptomoj de traŭmita koronaria cirkumfleksa arterio en la kazo de transpozicio, rezultantaj al infarkto de malpligranda amplekso, estis versimile kaŭzita per relative distala lokalizo de la lezo. En la dua okazo estis la kaŭzanto de la traŭmiĝo la kudrero. Post supraĵa lokiĝo de la kudrero la signoj normaligiĝis. Unu branĉo de la korkrona arterio trairis en tuŝapuda proksimeco de postleza komisuro de la mitrala valvulo. Dum anuloplastiko trapikis unu kudrero arterion, parte obliteris ĝin, kie rezultigis formon de la trombo, kaj totalan okluzon, kies sekvo estis la infarkto. Post la operacia tempoperiodo ne aperis klinikaj simptomoj de la infarkto. Laŭ la sciigoj en la literaturo estas tiu ĉi kompliko akompanata per nereigebla sindromo de la malaltigita kora efikeco tuj post la operacio kaj la pacientoj dum kelkaj tagoj mortas. Ĉe la priskribita kazo okazis totala okluzo dum kelkaj tagoj post la operacio kaj la plej versimila kaŭzo de la morto estis subita aritmio. Ĉe la ĥirurgio de la mitrala valvulo necesas progresi tre singarde de lokigo de la kudreroj en la anulon en la aero apuda al la valvulo. La kudrero devas havi plej eble la supraĵan trairon, ĉar la maldekstra cirkumfleksa koronaria arterio povas estis situanta en malproksimeco de 1 – 2 mm. La plej kriza areo estas la parto de la mezo de la mura valvulo ĝis postmeza komisuro, kie estas kalcifikaĵoj. En antaŭlatera komisuro estas situantaj ĉiuj aliaj ŝanĝoj.

Esperanto kaj psoriazoz

Ken J. Hadler, delegito de UEA, organizanto de Universala Psoriazoz-Asocio, Croft House, The Croft, Hastings, Sussex, TN 34, 3HH, Anglujo.

Psoriazoz estas haŭtmalsano, kaj oni kalkulas, ke proksimume 2% de la monda loĝantaro suferas pro ĝi. Partoj de la haŭto iĝas ruĝaj kaj surhavas arĝentkolorajn skvamojn. Por suferantoj la haŭtdifekto kompreneble kaŭzas grandan embarason.

Ŝajnas, ke ĝis nun, ne estas vera resanigilo. La haŭtaj makuloj aperas kaj malaperas, kaj pro tio multaj konfidas la privataj resanigiloj, ĉu banado, ktp, sed la vero ŝajnas esti, ke „mirakla resanigilo“ ne ekzistas.

Oni trovas, ke la ĉeloj de la haŭto de psoriazozulo tro rapide superiĝas de la bazo ĝis la surfaco. Por ne-suferantoj ili bezonas de 20 ĝis 40 tagojn. Por suferantoj de 4 ĝis 7 tagojn.

En kelkaj landoj psoriazozuloj fondas asociojn kaj por esperantistoj estas „Universala psoriazoz-Asocio“, kies adreso estas Croft House (vidu adreson de la aŭtoro). Ĉi tiu rondo havas 55 esperantistojn-suferantojn, kiel membroj el 20 landoj. Ĝi regule ricevas diversajn raportojn, kiujn ĝi plusendas al la brita Psoriazoz-Asocio (The Psoriasis Association“ 7 Milton street, Northampton. Ek de la jaro 1973 ĝis nun ĝi sendis 58 raportojn, inter ili pri novaj landaj psoriazozaj asocioj trovitaj de la samideanaro.

Niaj legantoj, kiuj estas dermatologoj, eble interesiĝus pri la plej freŝa informo pri psoriazado de la Universala Psoriazado-Asocio.

1. Drogo kun nomo METHOXSALEN estas fabrikata el kreskaĵo, kiu estas plantanta en Egiptujo. Psoriazulo deglutas pilolon kaj poste ricevas tn. nigran lumon. (Rimarko de la readkto: Temas pri fotoĥemoterapio. Degluto de planta efika substanco estas fotosensibiligilo, kies efiko estas ligata al Long wave ultra-violet light known as „blacklight“ – longonda ultraviola lumo, konata kiel „nigra lumo“.) Oni nun eksperimentas en kelkaj landoj kun tiu ĉi nova metodo.

2. Grava nuna demando estas, ĉu psoriazuloj havas sufiĉe bonan imunologian defendon kontraŭ la viruso, kiu kaŭzas malsanojn varicelon aŭ herpes-zosteron. Ĉu estas rilato inter ĉi tiuj du malsanoj kaj psoriazado? En Usono la membroj de „The psoriasis research association Inc, la asocio por enketo pri la kaŭzoj de psoriazado nun urĝe interesiĝas pri tiu temo.

KIE FINIĜAS LA EBLOJ DE LA ĤIRURGIO?

Dum lastaj dek jaroj okazis eksplodo de la ĥirurgio. La supozo por tio estis ne nur pli granda lerteco de ĥirurgoj, sed antaŭ ĉio novaj ebloj de la tekniko, kiu maturiĝas al pli frutempe neimageblaj rezultoj. Estas do kompreneble, ke ĉiu tiu progreso gvidis al tiuj konkludoj, kiuj apartenas jam en areon de utopio. Dum la 29-a kongreso de kuracistoj, kiu okazis en oktobro 1975 en Vieno, estis pro tio farita pruvo klarigi, kiaj samtempaj ebloj de la ĥirurgio, kaj kion necesas ankoraŭ apartenigi al la areo de utopio. Pri tio referas la gazeto „Artzliche praxis“.

Teme la transplantadoj de la parenkimaj organoj estas plu la reno unusola organo, kiu estas rutine transplantata. Ek de la jaro 1972 okazas tage 10 tiaj operacioj. Ĝis aprilo 1975 estis registritaj preskaŭ 21 mil transplantadoj de renoj en 293 centroj de la mondo. Preskaŭ duono de pacientoj de transplantita kaj bone funkcia reno ankoraŭ vivas. Plej longe post transplantado, nome 19 jaroj, vivas paciento, ĉe kiu temis pri aŭtogeno transplantado de la vivanta monozigota gemelo, do de genetike identa, kaj sekve de tio de la plej ideala donacinto. Ĝis la sama tempo termino estis transplantitaj 236 hepatoj. Ĝis la tago de la komparo vivis 100 da pacientoj, plej longe la angla virino, nome 5 jarojn kaj 7 monatojn, ĉe kio la hepato estas laŭ funkcia vivpunkto sendifekta. Tio estas realaj faktoj kaj la hodiaŭa stato de la transplantado de abdomenaj parenkimaj organoj. Demandon, kia estos la estonteco de tiu areo de ĥirurgio, oni povas respondi nur tiam, se ni preterlasas la kutiman pensmanieron. De tiu aspekto estus ebla transplantado de ĉiuj organoj. Nur utopio estas transplantado de cerbo.

La dua granda areo de esperdonaj ĥirurgiaj operacioj prezentas angiaj rekonstruoj. Ili hodiaŭ progresis tiom multe, ke eĉ ĉe gravaj lezoj oni povas savi homon antaŭ la amputacio. Ĉe kronikaj arteriaj obstrukcioj estas hodiaŭ je dispono du rekonstruaj principoj: angia desobliteracio kaj bajpasa (pretera, pretervoja) operacio.

Dum la kongreso estis ankoraŭ referite pri novaj konoj pri artefarita koro. „Parta“ artefarita koro konstruita far vienaj scienculoj estis uzita ĝis nun ĉe kvin bovidoj. Ĉe unu el ili ĝi estis lasita en la korpo dum 73 tagoj, poste forigita, ĉe kio la besto transvivas, ceteraj bovidoj mortis post 46-131 tagoj pro teknika malfunkcio de tiu artefarita kora kamero kaj pro tromboemboliaj komplikadoj. Dum postoperacia malsanigo estis en tiu eksperimento helpe de mezurado de la premo kaj helpe de angiografio sekvita, kia estas la funkcio de tiu ĉi artefarita koro kaj estis ankaŭ objektivigita amplekso de mallevigita ŝarĝo de maldestra kamero.

La problemo de energia fonto ĉe la artefarita koro ne estas ankoraŭ fideinde solvita. Dume estas necerte, ĉu uzi elektromagnetikan, elektran aŭ atoman energion. Enaorta baloneta

pumpo, artefarita kamero kaj artefarita koro estas evoluaj formoj de la mekanika vivteno de sancirkulo. Unue nomita ekipaĵo estas pli komplikita. Ĝia ĥirurgia implanto estas ligita al pli grandaj malfacilaĵoj. Ilia uzo plialtigas la danĝeron de tromboemboliaj komplikaĵoj, de infekto, sed kunportas ankaŭ pli grandan danĝeron de malfunkcio.

Tiuj sistemoj estas ajm hodiaŭ uzataj dum insuficienco de maldekstra koro, sed por pli proksima tempo oni ne kalkulas kun uzo de artefarita koro. Kontraŭ certaj perspektivoj tiurilatantaj, liveras artefarita kanalo pli grandan esperon, nome pro ĝia transira uzo. Koncerne la temon de transplantado koro-pulmo konkludis la franca delegito eble tiusence: Transplantado de la koro reprezentas post la solvo de ĥirurgiaj kaj kelkaj imunologiaj problemoj la realaĵon. Daŭre ĝi restas parta utopio tiusence, ke estas malfacile trovi konvenan donacanton kaj ankaŭ pro tio, ke ekzistas problemoj, kiuj ekzemple ĉe la transplantado de reno estis solvitaj per uzo de transplantita reno.

Koncerne transplantado de pulmo estis en la tempodaŭro 1963-1974 faritaj 36 transplantadoj plejparte pro kronika respiratoria insuficienco, dum ĉe 3 okazoj temis kominita transplantado de la koro kaj pulmo. Ĉiuj malsanuloj mortis. La plej longa tempo de transvivo estis 10 monatoj. Eĉ kiam la spertoj montris, ke la transplantita pulmo estas kapabla certigi al si sufiĉan sangopleniĝon kaj labori sen pruve altigita rezisto de la pulma sangofluejo, restas eĉ ĉi tiu multaj demandoj ne responditaj.

El la epoko de la transplantado de artefaritaj organoj:

Manjo, rapide telefonu al elektririparejo, ŝajnas al mi, ke mia koro ĉesas funkcii!“

REZULTOJ DE LA ESPLORO EN LA KVINA KVINJARPLANO

Daŭrigo el la pasinta numero – Prof. MUD-ro J. Houštek DrSc, MUD-ro L. Pelech CSC, Universitato de Karolo en Prago

Reŭmatologio (prof. M. Vykydal, LFUP Olomouc) – metode estis solvita problemo de simultana biopsio de artika endotelo kaj de artika kartilago, estis pruvita impeta kresko de incidenco de podagro, estis prilaborita kuraciga kontribuo de penicilinamino ĉe kelkaj kolagenozoj kaj progresantaj poliartikitoj.

Pneumologio (doc. Mecl, ÚNZ NVP Prago) – estas eksterordinara signifo de la kolekto da verkoj pri patogenezoj kaj evoluo de pulma hipertensio ĉe hiperventolaj formoj de la pulma koro – grava estas konstato, ke samtempe ne estis eble pruvi malsaniĝon je bisinzo en niaj fabrikoj de kotono – observataj malsaniĝoj estas tipe spasmaj bronkitoj.

Tuberkulozo (D-ro Trnka, VUTRN, Prago) – proponita diferenciga radiofotografia esplorado sukcesis en terena praktiko – estis ellaborita standarta metodo de kvantitativa kulturado kaj mikroskopado de la bacilo de Koĥ, kiu estas rutine uzadata – por plibonigo de la ĥemoterapio de tuberkulozo estis eldonita metoda folio de la ministerio por sanitaraj aferoj de ĈSR.

Fiziatrio kaj balneologio (doc. Raušer, IKEM Prago) – estis disvolvita kompleksa metodaro por observo de perturboj de lipida metabolismo dum kondiĉoj de kuraĉloka terapio. Estis ellaborita prijuĝo pri eblo de konstruo de joda kuraĉloko en la ĉikraŭaĵo do Hodonin (Hodonjin).

Rehabilito (Doc, Janda, IFL Prago) – por praktiko estas signifa apliko de konoj pri rehabilito de kormalsanuloj, estis verkita propono de dispozicioj por prevento de ekesto de vertebrogenaj difektoj precipe ĉe junaj personoj.

Onkologio (prof. Švejda, IKEO Brno) – en imunologio de tumoroj estis atingitaj signifaj efikoj per uzo de BCG-vakcino – signifa estas ankaŭ tn. celinta ĥemoterapio, se la efika substanco estas mallongtempe konstatata en la hista kulturo.

Gerontologio (D-ro Trojan, ÚNZ NVP Prago) – estas tipitaj personaj ĥarakterizaĵoj kaj socialaj situaĵoj, kiuj estas por maljunaj civitanoj riskaj kaj gvidas al ilia sociala maladapteco.

Klinika farmakologio (doc. Elis, CSAV) – estis kreitaj supozoj por racia uzo de psikofarmakoj – per klasifikigo de neŭroleptikoj laŭ ilia terapia profilo kaj apero de nedezirataj efikoj estis ebligita rapida envicigo de nove sintezitaj ĉeĥoslovakaj neŭroleptikoj kaj per tio ilia enkonduko en klinika praktikado.

Klinika bioĥemio (prof. Hořejší, UHKT Prago) – dum studo de aminoacidoj estis celita atento de serĉado de ennaskaj metabolaj perturboj de aminoacidoj per enkonduko de pluaj testoj – en toksikologio de AMANITA PHALOIDES (verda muŝagariko) estis precizigita diagnozado de intokso per fungoj, kio havas praktikan signifon ne nur por medicino, sed ankaŭ por nutraĵa industrio, por la praktiko estas signifa precizigado de diagnozo kaj prognozo de malsaniĝo per melanoblastomo per konstatoj de aromaj aminoacidoj kaj iliaj metabolaĵoj.

Radiologio (Prof. L. Steinhart, LF UK Hradec Králové) – estis pruvita signifo de eluzo de densografio ĉe mitralaj difektoj, signifa estas finkonstruo de originala esplormetodo per radioaktiva ksenono ĉe vundoj de genuo, per enkonduko e de endoskopa retrograda ĥolangiopankreatografio estis disvastigita aro da diagnozaj metodoj por esploro de pankreato kaj galduktoj, per originala maniero estis perfektigita esploro de mamoj per ultrasona metodo kaj dislaborita metodo de termografio per fluaj kristaloj – tio signifas grandan ŝparon de devizmono.

Nutrado kaj metabolismo – (prof. Mašek, IKEM Prago) – estis pruvita favora efiko de dieto kaj enbuŝe aplikataj aminoacidoj kune kun anabolismiloj ĉe malsanuloj pri denutricio, estis denove konstatita pli favora malsaniro de gripa epidemio ĉe ministroj de Ostrava-Karviná-karba ekspluatregiono, nome per aldono de fiziologiaj kvantoj de askorba acido, kio signifas grandan helpon por malaktigo de la laborkapableco.

Ĝenerala ĥirurgio (prof. Špaček, LFUK Prago) – la plej signifaj rezultoj koncernas kompleksan kuracadon de ĥronikaj stafilokokaj infektoj per kombinita ĥirurgia kaj imunologio metodo, estis evoluigita gluilo por vundoj surbaze de plastaj materialoj, kiu estas plene komparebla kun eksterlandaj similaĵoj.

Ĥirurgio de brusto kaj abdomeno (prof. Polák, LFH UK Prago) – estis ellaborita nova metodo de alpaŝo al la unua ripo el aksilo kaj aplikita ĉe tuta vico de skalena sindromo en praktiko, dum kuracado de antaŭhepata porta hipertensio plej bone pruvigis mezenteriokavaj kunigiloj, estis pritaksita fidindeco de malrekta izotopa limfografio per radiokoloida oro dum esplorado de pelvo kaj abdomeno, tre valora estas provoko de kronika stomaka ulkuso ĉe bestoj post submukoza injekto de stomaka suko.

Kardioĥirurgio (prof. Pročázka, LF UK Hradec Králové) – estis ellaborita originala metodo de sangocirkulado per speciala penumatika paprato dum substituo de kora agado, estis gajnitaj novaj konoj por plibonigo de diagnozado de trikuspidaj difektoj.

Angiologio (prof. Hejhal, IKEM Prago) – estis gajnita diagnoza procedmetodo por pli frua ekkono de stenozo kaj ebliteracio de branĉoj de aorta arko, estis precizigitaj indikoj por ĥirurgia rekonstruo ĉe malsanuloj kun freŝaj manifestoĵoj de cerba iskemio kaj indikoj por unuopaj tipoj de ĥirurgia rekonstruo de arterioj, provizantaj malsuprajn ekstremaĵojn, estis evoluigitaj, pritaksigitaj kaj en produktado enkondukitaj novaj tipoj de angiaj protezoj, kiuj per siaj ĥarakterizaĵoj eĉ superas eksterlandajn produktojn.

Neŭroĥirurgio (prof. Kunc, FVL UK Prago) – baze estis eltigita la procento de ĥirurgia sukceso dum kuracado de epilepsio, estis evoluigita kaj en praktikon enkondukita aparato, ebliganta longtempan observadon kaj samtempe aŭtomatan regulaon de interkamera tensio, signife estis antaŭŝovitaj limoj de operacieblo de arteriovejnaj malformiĝoj kaj per tio disvastigita prevento de danĝeraj encerbaj sangumadoj.

Traŭma ĥirurgio (doc, Kroupa, VÚT Brno) – esits proponita nova maniero de fiksado de mandibulo post rompiĝoj, estis plibonigita operacia procedo helpe de vertikale enkondukita najlo kaj de enigebla najlo ĉe frakturoj de femora kolo, estis ellaborita modela eksperimento de grasa embolio celanta malatigi mortecon (ĝis nun 50%) de tiu ĥirurgia komplikaĵo.

Plastika ĥirurgio (prof, Pešková-LFĤ UK Prago) – estis ellaborita operacia taktiko de la substituo de amputita dikfingro per alia fingro, ĉefe per la kvara fingro; en la praktikon estis enkondukitaj protezoj de malgrandaj artikoj de manfingroj, enlande produktitaj; en praktiko estas ankaŭ uzata implanto de biologia grefto de la kapo de koksa ostoj.

Pediaria ĥirurgio (prof. Kafka, FDL UK Prago) – ĉe infanoj dum operacioj de kriporĥismo estis ellaborita kaj eksperimente kaj klinike pruvita nova maniero de fikso en skroto; estis konstatita pli ofta apero de subdura hematomo, kiu invalidigas infanojn kaj estis pruvitaj bonaj operaciaj efikoj de frue diagnozita malsaniĝo.

Ginekologio kaj akuŝologio (Dro Vedra, UPMD Prafo) – novaj ekkonoj dum praktikado de antikoncepcio baze malamtigis nombron de komplikaĵoj; estis plibonigita diagnozado de prekancerozoj de utero cerviko kaj prekancerozoj de mamoj; estis plibonigita prevento de malfruaj gestozoj per kuracado de tiel nomataj asimptomaj bakteriurioj kaj per kuracado de utermalsufiĉeco; en la produktado estis enkondukita en la praktiko jam uzata nova ĉeĥoslovaka preparato ABTILYZINO, kiu pruviĝis dum kuracado de funkciaj sangumoj, kiuj estas ĉefa kaŭzo de labormalkapablo de virinoj.

Urologio (prof. Uhlíř, LF UJEP Brno) – estis konstruita nova akustika sondilo, ebliganta trovi dum operacioj pli malgrandaj konkrementojn en renaj kalikoj; estis ellaborita metodo pri substituo de urina veziko per kolagena protezo; estis ellaborita kaj pruvita taktiko kaj tekniko por superpuba punkcio kaj originala modifo por hemostazo dum operacioj de adenomo en prostato; estis pruvite, ke dum preparo de malsanuloj pro hipertrofio de prostato por operacio sufiĉas pli multekosta kaj priŝarĝanta eliga urografio.

Ortopedio (doc, Fiala, LFUK Hradec Králové) – estis evoluigita kaj en praktiko elprovita ĉeĥoslovaka totala protezo de koksa artikoj, kiu povas konkuri kun pintaj eksterlandaj produktoj kaj per kelkaj parametroj ilin eĉ superas. Plue estis elprovita ĉeĥoslovaka osta cemento ACRYLOSANO; estis tiamaniere faritaj supozoj por ŝparo de devizaj valutoj.

Oftalmologio (doc, Balík, FVL UK Prago) – enkonduko de infraruĝa pupilografio kaj pulioskopio ebligis ebjektivan esploron de adapto precipe ĉe malkrajaj statoj kaj funkciaj perturboj; bazan kontrubuaĵon havas la pruvo de duopa inerviĝo al kerato kun respekto pri ĝia trofiko; plibonigita estis la diagnozado kaj malkovrado de glaŭkomo.

Otoronolaringologio (prof. Sedláček, FVL UK Prago) – por esploro de bazaj faktoroj de direkta aŭdo estis konstruita speciala aparato; plue estis konstruita aparato stenokvantografio, pritaksanta objektive stenozojn de spivojoj; estis perfektigita kaj disvastigita malkovrado de aŭdaj difektoj kaj enkondukitaj metodoj de objektiva aŭdiometrijo ĉe suĉeinfanoj; estis plibonigita diagnozado de otosklerozo per enkonduko de nova metodo, ebliganta fidindan diferencigon de aktiva kaj inaktiva formo de la malsaniĝo.

Stomatologio (prof. Urban, VÚS Prago) – estis ellaborita metodo de denta premkopio por totalaj protezoj, kiu plibonigas adhezon de substituantaj materialoj kaj bone pruviĝas en la praktiko; signife progresos la evoluo de tn. kompoziciaj ŝtopiĝaj materialoj, kiuj signifas

kvalitativan revolucion en ŝtopiga tekniko pro siaj meĥanikaj ecoj kaj eco de firma ligigo al adamantino – ĝisnunaj pruvoj montras, ke la specimenoj ĉe ni produktitaj egalas per siaj ecoj similajn multekostajn materialojn, importataj el kapitalismaj ŝtatoj; per vastskale gvidata kuracado de orogacialaj karcinomoj estis por unuopaj lokiĝoj meze de 10-15% pli alta nombro da kazoj de kvinjara travivo de pacientoj kompare al fremdaj reprezentativaj trarigardoj; enkonduko de la nova metodo por desinfekto de almetaĵoj, genuetoj kaj unitoj helpe de solvaĵo DESIDENTo simpligis la dentopraktikadon kaj ebligis devizan ŝparon.

Mikrobiologio, epidemiologio kaj kliniko de infektaj malsanoj (prof. Patočka, FVL UK Prago) – estis ellaborita nova skemo de vakcinado kontraŭ liso per ŝeĥoslovaka vakcina materio BABIVACo; ekstreme malfavoran kreskan tendencon montras rezisteco de PSEUDOMONAS AERUGINOSA; en praktikon estis transdonita diagnozado de infektoj kaŭzitaj per patogenoj YERSINTA ENTEROCOLICA; estis pruvite, ke eĉ facile steriligitaj instrumentoj, kiel estas ginekologia spegulo, estas ofte kaŭzo de nasokomiala infekto; imunofluoreska detekto de infektaj bakterioj en urino montriĝis en praktiko metodo tre simpla kun tujaj kaj alte signifoplenaj efikoj; derivajoxj de timolo estis purvitaj kiel substancoj antifunge efikantaj kun ebleco de enkonduko en la praktikon; cistoj de amebaj de la tipo limako montriĝis nekutime rezistemaj kontraŭ desinfiko.

Higieno (prof. Janda, IHE Prago) – estis atestitaj kelkaj ekkonoj pri influo de malpurigado atmosfera je korpa evoluo kaj sanstato de infanoj en lernejaĝo; estis konstatitaj mutagenaj efikoj de ĥemiaj substancoj en medio, precipe de kelkaj herbicidoj; estis pruvite, ke unu el la plej grandaj fontoj de nitrogeno dum eŭtrofigo de nia akvaro estas ŝpruclabadoj de terkulturite prilaborita tero; en praktiko estis vaste verifita metodo de testoj pri lerneja matureco; estis ellaborita metodoj de kalkulado pri atmosfera malpurigo helpe de kriza koncentriĝo, per metodo de naalitiko de mikotoksinoj en nutraĵoj kaj metodoj de detekto de antibiotikaj reziduo en nutraĵoj.

Labormedicino (prof. Teisinger, IHE Prago) – estis provita plej alte permesita labora tempo en varme pretendemaj produktejoj; per ergometraj metodoj estis konstatite, ke per enkonduko de nova teknologio en magazenoj de ligno estas ŝparebla duono de viva laboro.

Preparo de serumoj kaj vakcinaj substancoj (dro J. Málek, USOL Prago) – en esploro de baktericidoj estis ellaborita metodo de preparo, purigado kaj liofilizacio.

Socia medicina (prof. Bílek, USLOZ Prago) – estis ellaborita propono de nova labordivido (hromada) en apoteko; estis konstatita bezono de litoj de ok ĉefaj indikoj de infanaj hospitaloj; estis malkovritaj novaj informoj pri la sciencaj verkoj de J. E. Purkyně (purkinje).

Ekspertiza medicina (prof. Bureš, ILF Prago) – estis proponita revido de ĝisnunaj prijuĝantaj kriterioj ĉe malsanoj, kiuj estas la plej ofta kaŭzo de invalideco; estis gajnitaj novaj konoj, signifoplenaj por prevento de invalideco; estis prilaboritaj bazoj por proponoj de direktivoj kaj dispozicioj de la ministerio pri sanitaferoj, ministerio pri lernejaferoj kaj ministerio pri labor- kaj sociaferoj por vidence trafita en unuopaj tipoj de lernejoj.

Modelo de ekonomio de unueca sanitara sistemo en ĈSR (ing. Vlach, ministerio pri sanitaferoj) – estis ellaboritaj metodaj direktlinioj trafantaj reguladon de salajfondusoj en sanitara industrio.

Finvorto: por la legantoj: En du numeroj de nia bulteno ni antaŭmetis por la legantoj resumon pri planita laboro de medicinaj scienculoj kaj ties atingoj. Ni volonte havigos pli detalajn informojn pri unuopaj temoj por la interesotoj aŭ atentigos pri literaturo, kie la interesotoj povas gajni informojn. Ni respondos perletere aŭ publike ilian demandon. Kontraŭe ni petas legantojn, kiuj kapablas informi en konciza raporto pri progresoj de

medicino en ilia ŝtato kaj rezultoj de teama laboro de scienculoj, pri kiuj ili opinias, ke ili povus interesi ankaŭ aliajn legantojn, ke ili skribu al ni aperigeblajn raportojn.

Faktoj pri Ĉeĥoslovakio

Tridek jaroj

Scienco kaj tekniko

Lando de turismo

nomo	:	Ĉeĥoslovaka respubliko
areo	:	127 871 km ²
administra	:	du socialismaj respublikoj,
divido	:	Ĉeĥa (CSR) kaj Slovaka (SSR)
loĝantoj	:	14 738 000 (1974) el tio ĈSR 10 023 000, SSR 4 715 000
naciecaj	:	germana, pola, ukraina, hungara, entute 5%
malplimulto	:	de logxantaro
ĉefurbo	:	1 156 000 loĝantoj (1974)
aliaj urboj	:	Brno 377 mil., Bratislava 286, Plzeň 146, Košice 137
ekonomio	:	altgrade evoluinta industria kaj agrikultura ŝtato kun
	:	konsiderindaj trovejoj de mineraloj
mono	:	ĉeĥoslovaka krono (Kč) = 100 heleroj

Mallonge pri la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio

Novinka – Novaĵo – Novinka – Novaĵo

Ĉeĥa Esperanto-Asocio eldonis antaŭ ne longe novan libron kun simpla titolo: Ĉeĥoslovakio – tridek jaroj. Lasta traduko de M. Lukáš. Redaktis kaj la ĉapitrojn pri E-movado en ĈSSR verkis O. Kníchal. Kunlaboris ing. F. Sviták kaj J. Mařík.

Libro estos certe valora por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Ĉeĥoslovakio. Mendu do novan libron tuj ĉe asocio. Prezo estas aŭ 7,- Kč aŭ 2 irpk. Fremdlandanoj aldonu 1 irpk por poŝtelspezoj. Elsonkvanto ne estas tro granda – do ne atendu!

Leŭkemio kaj risiko de karcinomo:

/JAMA 232,3.267, 1975/

Intrer la jaroj 1955 kaj 1974 estis hospitale kuracataj 102 pacientoj pro kronika limfa leŭkemio. En la nomaro estis eble 2/3 de viroj. Entute 26 personoj malsaniĝis pli poste pro kancero. Ĉe 4 el ili la kancero versimile antaŭiris leŭkemion, ĉe unu malsanulo oni konstatis ambaŭ malsanojn samtempe kaj ĉe 16 pacientoj ekestis karcinomo nur post diagnozo de leŭkemio nur post diagnozo de leŭkemio. Plej ofte estis diagnozita karcinomo de haŭto. Se oni komparas kun ĉi tiuj 16 malsanuloj teorie similan kontrolan grupon da personoj, tiam la rezultoj parolus pri tio, ke ĉe kronika limfa leŭkemio oni povas kalkuli kun pli alta risiko de karcinomo. Por karcinomo de haŭto estis tiu risiko 8-oble pli alta kaj por aliaj lokiĝoj de karcinomo eble 3-oble. Tiu ĉi pliatigita risiko estas klarigata per abnormalaĵoj de tiel nomataj T-ĉeloj, per efiko de eksterordinara blokanta faktoro aŭ per propra terapio de leŭkemio.

TESTO PRI TUMORA LEZO DE HEPATO

/Science 190,4209:58-60,1975/

Estis konstatite, ke eliminado de cikla guanosinmonofosfato (c-GMP) per urino ĉe ratoj kun hepatomo de Morrison 3924A kaj ĝia kvanto estas en korelativo ($r=0,842$) kun granda de la tumoro. Per radiigo de la tumoro aŭ ĉe apliko de 5-fluorcuracilo malgrandiĝas kaj la granda

de la tumoroj kaj eligo de c-GMP en urino. Ĥirurgia forigo de la tumoroj havas sekvon de tija mallevigo de eligado de c-GMP sur bazan nivelon. Eligado de c-AMP (cikla Adenozinmonofosfato) diference de c-GMP, kiu entute ne ŝanĝas. Tial estas verŝajne, ke la mezurado de eligado de c-GMP per urino povas esti bona diagnoza testo por tumoraj malsanoj trafantaj hepaton.

ANEŬRISMO DE LA ABDOMENA AORTO

/Zeitschrift für die gesamte innere Medizin-GDR;30,16,156-159,1975/

Leviganta procento e la loĝantoj de pli aĝaj grupoj en la populacio kun ĉiam pli ofta apero de ateroskleroza angia trafo portas kun si eĉ la danĝeron reprezentitan per rupturo de aneŭrismo de abdomena aorto. Ĉi tiu okazintaĵo ĉiam reprezentas pro la vivo priminacantan staton de eksterordinara graveco. Temas pri relative malofta malsano, kies deverspekta klinika bildo estas ĉiam kaŭzo de diangozaj malfacilaĵoj. Oni menciadas, ke ĉe frutempa diagnozo kaj kvalifikita operacia solvo oni povas savi eble duonon de malsanuloj kun rupturo de la abdomena aneŭrismo. La signifon de tiu ĉi okazaĵo montras ankaŭ analizoj de la sekcia materialo, kiuj estas menciitaj en la universitato Tartu en Estona SSR. Multiĝas la nombro de la aterosklerozaj aneŭrismoj, malmultiĝas luesa etiologio de tiu ĉi malsano. Estas menciita kazuistiko de 21 propraj kazoj, ilia diagnozo kaj la plej grandaj simptomoj.

Malakraj vundiĝoj de la pankreato

/Schweizerische medizinische Wochenschrift 105,43:1395-1398,1975/

Dum vundiĝoj de la abdomenaj organoj okazas eble ĉe kvinono de kazoj de kuntrafo de la abdomena pankreato, kaj el ili ĉe triono de kazoj temas pri malakra vundiĝo. La opinioj pri kuracado de tiuj statoj ne estas dume unuecaj. Malhelpas ankaŭ la situo de la organo, kiu ne estas bone alpaŝebla por kutimaj esplormanieroj. Nun estas menciita kazuistiko de 10-jara knabino, kiu estis dum biciklado trafita per malakra vundiĝo de la maldekstra subripa regiono. Komence temis pri malgrandaj doloroj de la maldekstra epigastrio, sed la doloroj estiĝis dum 24 horoj netolereblaj, alpaŝis febro kaj vomado. Origina esploro atestis plej verŝajne rupturon de lieno. Sed ĝi estis post la malfermo de abdomena kavo netuŝita. Dum revizio de la kavo estis trovita eble 1 cm longa fendo sur pankreato. La knabino post la operacio rapide saniĝis, sed dum la senpera postoperacia periodo kreiĝis pankreata pseŭdocisto, kiu premis stomakon kaj inteston. Post la relaparatomio esti eĉ tiu stato regita kaj estiĝis plena resaniĝo.

Plilongigo de hunda vivodaŭro post transplantado de renoj

/el alia hundo/, traigitaj per aŭtologaj limfadenaj ĉeloj

Suponickij V. Ja., strato M. Grokĵogo 61-8, Barnaŭl-99,656099 USSR

Estas montrite, ke en kelkaj situacioj limfadenaj limfocitoj esence diferencigas laŭ siaj ecoj de limfocitoj el perferia sango (1,2) kaj eventuale la unuaj kapablas difinite transformiĝi post kontakto kun rena histo (3) – propra aŭ transplantita.

Estis enterprenitaj eksperimentoj kun rena transplantado ĉe hundoj de diversa pezo, sekso kaj aĝo, dugupe. La unua grupo estis kontrolo kaj enhavis 10 hundojn. Transplantado de reno estis farata sub la kolan haŭton, ligante renajn angiojn kun jugulara vejno ekstera kaj karotido arterio. La angioj estis ligitaj laŭ Jensen – metodo e ni modifita.

La uretero estis eligata sur la kolan haŭton. Post la grefto estis farata ambaŭflanka renektomio.

Por la dua grupo (eksperimenta) estis prenitaj 9 hundoj. rena grefto estis farata same kiel en la 1-a grupo, sed antaŭ kunligo de la angioj de la renan arterion estis injektata ĉelsuspenso el la mezenteriaj limfadenoj de transplantato al akceptonto en la kvanto= $1,2-6,8 \times 10^8$ ĉeloj kun vivkapablo (kolorigo pertripano blua) ne malpli ol 94%. Ĉe la plimulto de la hundoj limfocitkvanto en la ĉelsuspensoj estis ne malpli ol 91-92%. La ceteraj prezentiĝis kiel retikulocitoj kaj nukleosegmentitaj ĉelaj elementoj. Tuj post la ĉelsuspensa injekto la greftaj angioj estis klemataj por 15 minutoj, post tiu tempo estis repermesata trafresta sangocirkulado.

La iskemio de la greftitaj renoj ne superis 40 minutojn en la dua grupo kaj 15 minutojn en la unua (kontrola) grupo.

Postoperacia klinika bildo de kontrolgrupaj hundoj diferenciĝis de tiu en la dua grupo. En la kontrola grupo, komencante de la 3-a diurno plej ofte aperadis patologiaj ŝanĝiĝoj, kiuj karakterizas nekuracitajn renogreftojn. La lastaj iĝis pli kompaktaj, pligrandiĝis dimensie, en urino aperadis proteinoj, laŭdrade aperis kaj pliiĝis makrosangurinado. Antaŭ la morto de hundo renografto velkis, plene ĉesis funkcii kaj el la uretero eliĝis amaso de histodegeneraĵoj. Baldaŭ post ĉesiĝo de renogresta funkcio la hundoj mortis.

En la kontrola grupo klinika bildo estis alia. La renogreftoj plej ofte funkciis ĝis la hunda morto, eliminante helan urinon. Kelkiam la renfunkcio malboniĝis, sed pli poste renormiĝis. Nur en du okazoj la hundoj mortis en la stato pli supre priskribita. La ceteraj hundoj mortadis ĉe la funkcia renogresto. Preskaŭ ĉiuj kontrolgrupaj hundoj havis gravegan kaxheksion, kiu kaŭzis ilian morton. Proksimume duono de la hundoj antaŭ la morto havis sangoenhavan lakson.

Postoperacia vivodaŭro en la eksperimenta grupo multe superis tiun de la kontrolgrupaj animaloj: kontrolo – $5,75 \pm 0,37$ diurnoj, eksperimento $-12,6 \pm 1,61$ diurnoj.

Pligrandiĝo de hunda vivodaŭro post transplanto de renoj (alihundaj) prilavitaj per limfadenaj aŭtologiaj ĉeloj kune kun fortega kaŭksio de eksperimentaj hundoj kaj apero ĉe ili de antaŭmorta lakso supozigas, ke en ĉi okazo povis evidentiĝi iu varianto de „homologia malsano.“

LITERATURO: J. Suponickij, V. Ja., Bondarenko A. Z., Scepilova G. A.: „Voprosi ĉasnoj patologiĉeskoj anatomii“ (Izmjenja sivirotiĉniĥ bjelkov pri aŭto- i gomotransplantacii loĉek u sobak), Barnaŭl, SSSR. 1973,161.

Suponickij V. Ja. (K voprosu o transformacii limfotov“, tam je,165

Suponickij V. Ja. „Pri limfocit-ecoj de limfoglandoj“ en la „Scienca revuo“, 1971,v.22,N3,95.

HUMURO

Sinjoro Gremisulo revenis de la dentkuracisto kaj raportas al sia edzino:

„Manjo, okazis, ke doloris mia dento, sed mi kuraĝis lasi eltiri al mi tuj du!“

"Kaj kial," miras sinjorino Gremisulo.

“Nu, mi havis nur kvindekkronan monbileton kaj la dentkuracisto ne havis monon por redoni dudek kvin kronojn!”

„Ĉiam post degluto de la medikamento postglutu glason da akvo. Nome tiuj tablojdoj malloge gustumas.“

„Nu bone," ekgrumbli la trafito. „Sed per kio mi postglutu tiun aĉan malguston de la akvo?“

Dum la lasta vizito diris la doktoro al la paciento:

"Nun, kiam vi jam finfine pagis al mi, vi povas jam manĝi kaj fumi kiam vi deziras kaj kion vi deziras."

Mia patro mortis pro natura morto, sed mian edzon lasis la doktoroj morti pro infarkto.

Pardonu, sinjoro doktoro, ĉe la televidaparato mi ekdormas tuj, sed post tiuj viaj tablojdoj tio daŭras minimume unu horon.